# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 56, Numero 02, Aŭgusto 2020*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**

**Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else**


## Kio okazis ĉe Esperanto-Domo?

*Jonathan Cooper, kasisto de Esperanto NSW kaj vicprezidanto de AEA*

Pro la kronvirusa pandemio, niaj ĉiumonataj kunvenoj kaj merkred-vesperaj kunvenoj nuliĝis, tamen estrarkunvenoj ankoraŭ okazas rete, per Zoom. Membroj ekster la estraro estas bonvenaj partopreni (sendu peton al nsw@esperanto.org.au por ricevi la ligilon).

La kunveno en septembro estos nia jarkunveno (sekvota per ordinara estrarkunveno). Ĝi okazos (per Zoom) dimanĉon, la 13-an de septembro, komenciĝonta je la 11-a atm. (Rimarku: tio estos la dua dimanĉo de la monato, ne la unua kiel kutime.) Oficiala invito kun detaloj estos baldaŭ sendata al ĉiu membro.

La sabatvesperaj kunvenoj (Public Esperanto Learning) ankaŭ okazas per Zoom (la ligilo aperas en Facebook (facebook.com/EsperantoNSW). Tamen kelkaj homoj fojfoje venas al Esperanto-Domo kaj partoprenas de tie. (Rimarku: ĉiuj vizitantoj al Esperanto-Domo devas plenigi la kontaktregistron kaj observi interhoman distancigadon: 1,5m.)

Esperanto-Domo ne malfermiĝos ĉiun merkred-posttagmezon ĝis plua anonco. Ĉar Esperanto-Domo apenaŭ uziĝas ĉi-momente, la estraro decidis estus oportuna tempo por renovigi la necesejojn. Tiu tasko estos baldaŭ finita.

## Poŝtmarkoj

*Nicole Else, Sekretario de EFNSK*

Pasintmonate la Aŭstralia Poŝto havis reklamon, ke oni povas aĉeti specialajn poŝtmarkojn por kiuj oni povas mem elekti la bildon kaj la formon. Tio ĉiam eblas, sed pro la reklamo la poŝtmarkoj estis apenaŭ pli multekostaj ol normalaj poŝtmarkoj. Do la federacio mendis 40 poŝtmarkojn. Ili kompreneble estas veraj poŝtmarkoj kiujn vi povas uzi por sendi leteron ene de Aŭstralio. Belaj, ĉu ne? Kaj bone, ke ni eĉ povis elekti stelan formon. Vidu bildojn.



## La Viruso

*Terano, membro de EFNSK*

Ŝajnas preskaŭ ĉiutage la gazetaro raportas iom da novaj infektoj de KroViM-19, kiu estas la plej granda ĉiutaga kvanto en la lando ekde la komenco de la pandemio. Aŭ eble la ŝtatestroj anoncas ke la ŝtatlimoj restos fermitaj. Bedaŭrinde nun Aŭstralio klare estas en la dua ondo de la kronviruso. Eble pro tio nun estus bone se oni pripensus solvojn, por malplialtigi la nombron de malsaniĝoj pro la viruso... kaj malpli ebligi krei similajn virusojn.

Unue, la krizo ne damaĝas ĉiujn egale. En Aŭstralia (kaj aliaj landoj) la plej malriĉaj lokoj havas la plej malbonan problemon pri la viruso. [1] La plejmulto de la altinfektaj lokoj («hotspot») estas laborejoj. Ofte buĉejoj kaj viandlaborejoj (ekz. ŝafida buĉejo de Colac), kiu ofte havas malriĉajn kaj neblankajn laborantojn. La plej diskriminaciata popolo faras la laboron, kiun la pli privilegiaj homoj ne volas fari. Multe da infektantoj en kvaranteno foriras el siaj domoj por labori, ĉar tiuj bezonas la monon. Homoj ofte rifuzas KroViM-19-ajn testadojn pro timo pri perdo de siaj laboroj kaj pagoj. Ĉi tiuj problemoj damaĝas la tutan komunumon.

La solvo:
Aŭstraliaj sindikatoj volas, ke la registaro kreu pagan pandemian laborpaŭzon kun plena salajro. Por ĉiuj, kiuj bezonas testadon aŭ devas kvarantiniĝi, senrigarde la fojojn, kiuj okazas. Se oni komparas la koston de ĉi tiu politiko kun la kosto de daŭra ŝloŝado, pagaj pandemiaj laborpaŭzoj estas akvero el la maro. Estas klare, ke la registaro devas kontroli la krizon pli, kiu inkluzivas la subtenon de ĉiuj laborantoj por testi kaj mem-izoli.

Tamen ĉi tiu ideo (pagi al homoj por ne labori) estas kontraŭ la filozofio de la registaro de novliberalismo. Laŭ novliberalistoj, la popolo ne meritas helpon, ĉar la rolo de la registaro estas por «la ekonomio» aŭ «la nacia budĝeto». La civitanoj devus metafore tiri sin mem per siaj botlaĉoj. Imagu se la polico disdonus maskojn anstataŭ monpunojn! [2]

Estas alia parto de la viruso, kiu soleblas, sed multe da homoj sentas malkomforte pripensi… Ĉi tiu viruso kaj la plejparto de mortemaj virusoj estas elbestaj («zoonotic»). [3] Elbesta malsano estas malsano el besto, kiu povas infekti homon. La besta industrio bezonas bestojn en malgrandaj malpuraj kaĝoj, tiel produktas tiajn virusojn (kaj viandon por plezuro).

Kelkaj homoj pensas, ke ni povas murdi la bestojn pure (kaj humane kun bonaj kondiĉoj). Se la buĉejo estas sen koto, eble la virusoj ne kaŭzus tiajn malsanojn. Ne! Simple la geno de la homaro kaj aliaj bestoj estas tro proksimaj. Tiel viruso el planto ofte ne povas vivi en homo, sed verŝajne viruso el besto povas vivi en homo. Ne ekzistas sekuraj best-agrikulturaj metodoj, la sistemo mem estas la problemo. Verŝajne se la homaro ĉesigas sian manĝadon de bestoj, tio preventos la sekvan pandemion. Pri sano (kaj aliaj aferoj) preventado ĉiam estas pli facila solvo (kaj kostas malpli).

Dum ĉi tiam oni eble deklaras «la homaro estas la reala viruso», certe ni detruas la medion, murdas bestojn por sia propra plezuro. Tamen ni ne devus kulpigi la homaron aŭ eĉ apartajn riĉulojn, homoj ekzistis plejparte pace, sekve la nuna ekonomia sistemo kreiĝis. La sistemo estas la problemo, kaj tiel (laŭ mi) la plej taŭga solvo devus esti ke ni ŝanĝu sisteme la ekonomion.


Citaĵoj
1. Coronavirus Near Me, ABC 2020,
https://www.abc.net.au/news/2020-07-31/coronavirus-near-me-victoria-melbourne-postcode-data-covid19/12513684
2. First Dog on the Moon, Let's all wear a mask, The Guardian 2020,
https://www.theguardian.com/commentisfree/2020/jul/20/lets-all-wear-a-mask-lets-pretend-for-just-a-moment-we-care-about-other-people}
3. Michael GREGER, Zoonotic Disease, Nutrition Facts 2020,
https://nutritionfacts.org/topics/zoonotic-disease/

# Internacia Junulara Kongreso

*Doris Chen, membro de EFNSK*




Antaŭ mallonga tempo, mi partoprenis IJK 2020, kiu estis tre mirinda. IJK (Internacia Junulara Kongreso) estas ĉiujara Esperanto-junulara renkontiĝo okazata en malsama loko tra la mondo kaj gastigata de La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). La IJK 2020 estis origine planita okazi en Nederlando. Pro la efiko de la epidemio, la evento fariĝis interrete. IJK 2020 okazis de la 10a ĝis la 18a de julio. La interreta IJK uzis la platformon evoluigitan de E @ I. En ĉi tiu platformo, oni povis partopreni diversajn eventojn en formoj de video, audio aŭ teksto, inkluzive prelegoj, koncertoj, diskutrondoj, kvizoj, prelegoj kaj ludoj, ktp.




Ĉar la partoprenantoj venis de la tuta mondo, IJK-agadoj okazis dum la tuta tago. Por partpreni, oni povis pagi preskaŭ 20 eŭrojn por la aliĝkotizo, aŭ se vi estis pli juna ol 36-jara kaj ne partoprenis realajn internaciajn Esperanto-agadojn antaŭe, oni povis peti senpagan partoprenon en reta IJK. Speciale, en la aliĝilo, oni konigis ilin pri sia emo de senpaga partoprenado IJK, kaj tiam respondi kelkajn demandojn de ili retpoŝte. Bonŝance , mi rajtis partopreni IJK senpage post respondo al tiuj demandoj. Kvankam, pro mia studa praktikado, mi nur havis liberan tempon por partopreni agadojn semajnfine. Honeste, mi vere ĝuis la programerojn de Interreto-IJK, kaj esperegas partopreni realan renkontiĝon estontece.

EFNSW: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato estrarkunsido 11:00 ĝis 13:00
Por ĉiuj senpaga manĝeto, Esperanto Domo , Unua Dimanĉo de la monato 13:00 ĝis 15:00 (post la epidemio)
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Jaŭde 17:00 la Pancake Parlour, 122 Alinga St.,Civic. Huigh 02 6288 4334 *huighm@gmail.com*

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:
Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 15:00 – 17:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*

| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Andrew Spannenberg |
| Vic-prezidanto: | Dmitry Luŝnikov |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Jonathan Cooper |
| Estrarano: | Alan Turvey, Adam Levy |

